# LA VERDA LUPEO FENIKSO


N-ro 47 | 1979-4 (decembro) | 10a jaro

---

## Kluba informilo de ELF–AREK

### ELF: Esperanto Ligo Filatelista
### AREK: amika rondo de Esperantaj-kolektantoj

---



## Karaj klubaj geamikoj,

ne forgesu: nova jaro – nova kotizo! Kelkaj amikoj jam sendis la kotizon por 1980 al nia amiko Paulsson. Ankaŭ 1980 ni postulas 15 IRK, au egalvaloron en svedaj kronoj aŭ gmk. Tiuj niaj geamikoj, kiuj ne disponas pri tiuj valutoj eventuale povas pagi per esperantaĵoj. Tion prizorgas nia amiko Wluka en GFR. Kontaktu lin. Nepre atentu, ke via redaktoro ne akceptas kotizojn!

Nia amika rondo en pasintaj du jaroj konsiderinde kreskis, multaj novaj geamikoj nun estas inter ni, sed ankaŭ kelkaj ne pagis sian kotizon. Ni tamen sendis la informilon al ili, ĉar kelkfoje oni tutsimple forgesas pri ĉi afero kotizi. Hodiaŭ vi trovas en nia informilo aktualan membroliston. Se vi ne trovas vin en tiu membrolisto, do rapide egaligu vian kotizon por 1979. Sekvontjare ni ne plu povas sendi al tiuj la informilon, simple pro la altaj poŝtaj tarifoj, kiujn en tiu kazo pagas la ekspedinto el sia propra poŝo. Kaj se temas pri deko da tiaj nepagintoj, tiam rezultas jam rimarkebla truo en propra monujo. Sed la membrolisto kompreneble havas la taskon, faciligi la kontakton inter niaj geamikoj.

Ankaŭ ni aperigas kiel promesite unuan suplementon por nia stampokatalogo. Helpe de ĝi vi povas aktualigi vian katalogon ĝis novembro 1979.

Plie al eŭropaj klubanoj ni kunsendas aliĝilojn por IFER 80, en kies kadro ni okazigas kunvenon de tuta ELF-estraro kun niaj klubaj geamikoj.

*– via redaktoro Burmeister –*

## Kunveno de ELF–AREK 1980 en Leipzig (7–9.3)

La estraro de nia ELF–AREK decidis, okazigi Kunvenon de nia klubo en la kadro de IFER 80. IFER signifas: Internacia Foira Esperantista Renkontiĝo kaj ĝi okazos en la antaŭa tago de la Printempa Foiro de Leipzig 1980. Ni rajtas libere aranĝi nian programon kaj ricevas tiucele ĉambron de la organizantoj. Ni partoprenas en la komuna loĝado kaj manĝado kaj laŭvole en kelkaj programeroj de IFER 80.

Ni havas eblecon, priparoli aktualajn problemojn de nia kluba laboro. Krome denove eblas, persone renovigi niajn personajn kontaktojn amikajn.

La partopreno de nia tuta estraro estas certa: Venos amiko Paulsson, amiko Heimlich, amiko Burmeister (do: prezidanto, stampobanko kaj redaktoro), promesis veni ankaŭ amikoj Hasala, Hirsch kaj Kosieniak. Ni esperas, ke multaj aliaj el nia klubo venos al Leipzig. La proceduro de limtransiro estas relative simpla kaj senburokrata: niaj okcidentaj geamikoj povas aĉeti aŭ en vojaĝoficejo, aŭ en la gdr-limoficejo "foiran partoprenilon" (Messe-Ausweis) kaj posedanta tiun foir-legitimilon oni en la limo ricevas la gdr-vizon. Okcidentlandaj amikoj konsultu nian amikon Richard Hirsch en FRG (Bad Hersfeld), kiu jam dum jaroj praktikas tiujn vojaĝojn kaj estas tiurilate tre sperta. Por niaj orientlandaj geamikoj la proceduro estas eĉ pli simpla, kaj al ĉiu konata.

Aliĝilon kaj IFER-bultenon petu de la redaktoro.
En la IFER kutime partoprenas 150 personoj.

## *Detalaĵoj pri novaj kaj malnovaj stampoj*

### Lido de Jesolo en Italio

Nia kluba amiko Germano Gimelli partoprenis en la ĉi-jara 50-a itala kongreso de esperanto, okazinta de 25.8–3.9 en Lido de Jesolo apud Venecia.

La kongres-organizinto eldonis originalan suveniran karton, kiu prezentas guman naĝringon en formo de anaso, ligita al verda stelo (!). Sur la dika "ventro" de tiu verda anaso sin trovas la teksto: VENEZIA + LIDO DI JESOLO kaj:

**50a ITALA KONGRESO de ESPERANTO** + 25 AUG 1979

Plie oni eldonis suveniran koverton (bedaŭrinde litotukan) kan surpreso: 50a ITALA KONGRESO de ESPERANTO – JESOLO LIDO (Venecia) – 25 aŭg. – 3 sept 1979.

Feliĉe la kongres-organizinto ankaŭ havis la ideon, mendi de la poŝto memorigan stampon. La mia posedas la daton: 27-8-1979 kaj la italan tekston:

**50a CONGRESSO ITALIANO DI ESPERANTO**
**30017 LIDO DI JESOLO (VE)**

Ankaŭ la stampo prezentas tiun anason kaj poŝtan kornon. En kiuj tagoj la stampo estis en uzo, ankoraŭ ni ne scias.

### Kôbe en Japanio

Nia nova kluba amiko Kuriyama Hitosi partoprenis en la Kôbe Kaiin Kaikan (Marista Aŭlo en Kôbe) la 66-an kongreson de Japanaj Esperantistoj. Partoprenis ĉirkaŭ 500 esperantistoj kaj inter ili ankaŭ 25 eksterlandaj, kaj oni notis grandan kongresan sukceson.

En la kongresejo funkciis poŝta giĉeto kun memoriga poŝta esperanta stampo. La stampilon oni uzis dum 11 kaj 12 de augusto. En la stampo sin trovas japanlitera teksto, simbolo de koko, stelo kaj latinliteraj vortoj ESPERANTO kaj Kôbe.

LKK kiel kutime aperigis suveniran koverton tre buntan kaj belan (oceana ŝipo, havena lumturego, verda stelo k teksto). Nia amiko Maekaua sendis (promesis) al la stampobanko kvanton da stampitaj kovertoj.

### Hispanaĵoj 1979

Nia hispana klubano Lopez komence de oktobro 1979 sendis materialojn kaj informojn el la 39-a hispana kongreso de Esperanto, okazinta de 16–21 julio 79 (aŭ 18–20 julio) en Gijon. Speciale interesa por ni la uzado de loka poŝta memoriga Esperanto-stampo, uzita de 18–20 julio. La stampo havas diametron de 30 mm. Tutan rondan stampon kovras kvinpinta stelo, en ĝi trovis lokon grafiko pri la Gijon-a katedralo. La dato 18. JUL. 79 aperas sub la katedralo, la urbnomo GIJON sub la dato en la duobla cirklo, kie ankaŭ pozas la teksto:

**39a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO**

Kiel jam en pli fruaj kongresoj ankaŭ ĉifoje aperis pluraj aliaj memoraĵoj:
- maksimumkarto bunta kun foto de la katedralo kaj kun datoj 16/21 julio 1979
- sambilda glumarko kun samaj datoj
- memoriga koverto kun nigra alpreso de teksto kaj grafiko de Gijon-a katedralo. La datoj ankaŭ ĉi-tie 16–21 julio 1979
- memoriga koverto kun verda alpreso:

Kongreso de Hispana Esperanto Federacio
Gijon, 18–20 julio 1979
(koverto de ALFIL)

Pri kongresa insigno ni ne ricevis informon.

# Hago 1920: poŝta!

En numero 39 de nia informilo (decembro 1977) ni informis kaj montris poŝtkarton el la 12a UK de Hago 1920 kiu havis apudstampo kun la teksto

POŜTOFICEJO
DE LA
XIIa ESPERANTO-KONGRESO
HAGO, 8–14 Aúg. 1920

kaj alvokis nian membraron studi la aferon por eltrovi, ĉu tiu stampo estas poŝta aú ne.

En niaj informiloj n-roj 41 kaj 42 kaj ankaú en 45 ni pridiskutis tiun stampon. Hodiaú denove ni tuŝas tiun problemon kaj jen, kion skribis nia amiko Amouroux pri la afero:

"... El diskuto spruĉas lumo ... kaj tio refoje pruviĝas. Ni amiko Vana metis la fingron sur la ĝustan ŝaltilon ("Fenikso" n-ro 42, p. 11) Kvazaú laúvorte li analizis kio troviĝas en la kongresprotokolo de s-ino E.F. Cense ("Franca Esperantisto" n-ro 7–8, oktobro/novembro 1920, p. 111). La parto, kiu koncernas nin, tekstas:

Inter la laboroj same, kiel inter la amuzoj oni volonte retroviĝis en la lernejo Bleijenburg, kiu estis kvazaú sanktejo, kie oni trovis ĉiuspecan ĝojon kaj kontenton. Oni povis tie trankvile skribi, babili, eĉ manĝeti, kaj oni estis certa trovi ĉiam multnaciajn samideanojn ĉiam kontentajn retrovi unu alian. Plie oni trovis tie afablan poŝtiston, instalitan speciale por la kongresanoj, kiu estas mem lerta esperantisto. Tio tre faciligis la korespondadon, ĉar ne estis necese serĉi la poŝtoficejon en la urbo.

Tio signifas, ke la kongresanoj lasis siajn korespondaĵojn al tiu esperantista poŝtisto, kiu mem aplikis la "E-poŝtoficejan" stampon kaj la korespondaĵojn transdonis al la centra poŝtoficejo por normala stampigo kaj transsendo. Tio ankaú signifas, ke la koncerna E-stampo estas poŝta kaj sekve por ni kolektinda kaj kataloginda.

*Jean Amouroux ...*"

Do, karaj klubaj geamikoj, ni povas nin gratuli pro retrovo de forgesita, eĉ siatempe ne atentita poŝta esperanta stampo, ĉar pri la poŝteco jam ne ekzistas iu ajn dubo. Gratulon al la feliĉaj posedantoj, s-ino Anna-Greta Strönne, Vana kaj Amouroux. Denove ankaú pruviĝis, ke estas necese eĉ atenti kaj kolekti gumstampojn. Povas okazi, ke subite ili montriĝas poŝtaj. Sed ankaú nepoŝte ili estas interesaj por nia kolekto, ĉar lige kun normale vojaĝinta poŝtaĵo la tuto estas filatele uzebla.

Estus interese scii, ĉu ekzistas nederlanda stampokatalogo, sendube nun tiu stampo maknas en ĝi. Valoras mencii, ke nia SU 1 ankaú mankis en SU-stampo-katalogo, eldonita en la 60-aj jaroj. La filatelistoj-specialistoj en Sovetunio nur post eldono de la katalogo retrovis tiun stampon de Leningrado (kiun cetere mi ankaú jam vidis en nigra!).

Karaj klubaj geamikoj, certe en sekvonta stampokatalogo ni devas renversi la ĝisnunan ordon en la vicoj de la nederlandaj esperantaj stampoj kaj nia Haga de 1920 okupos la pozicion numero 1.

## Oficiala "E-Luzernaĵo" – faldfolio

Nia novmembro Lech Kosieniak jam bone atentis pri esperantofilatelaj "Luzernaĵoj" kaj raportis pri tiu faldfolia poŝta saluto. Nun nia amiko Amouroux klarigis la aferon kaj ankaŭ sendis fotokopion pri la koncerna objekto. Li raportas:

"La 29an de julio, malferma tago de la kongreso, la kunvenintaj membroj de la U.E.A.-komitato ricevis donace originalan filatelan saluton de la Svisa Poŝto. Temas pri kartona faldkarto, 15x10 cm, sur kies unua paĝo estas presita la svisa poŝta blazono kaj gluita la pm je 40c eldonita en 1978 okaze de la 800-a datreveno de la urbo Lucerno. La pm estas stampita per la memoriga kongresa poŝtstampo.

Sur la dua paĝo estas presita la jena teksto:
"ESPERANTO/UNIVERSALA/KONGRESO LUZERN 1979/
29. Julio 1979/ Ni deziras al vi agrablan tagon/via PTT/"

Sur la tria paĝo estas gluita la kongresa pm, ankaŭ stampita per la kongresa poŝtstampo.

Post eldono kaj uzo de pm, UTK kaj du poŝtstampoj, tiu dokumento montras (signifoplena estas la teksto de la 2-a paĝo) la intereson de la svisa poŝto por la 64-a UK kaj Esperanto.

La eldonkvanto estis verŝajne limigita je kelkdekoj da ekzempleroj.

*Jean Amouroux* –"

Atentigi mi volus niajn geamikojn pri simila eldonaĵo de la pola poŝto en la jaro 1959 por la 2 polaj E-pm. Mi siatempe aĉetis tiujn faldfoliojn en "RUCH"-vendejo. Tiujn faldfoliojn multaj esperantistoj posedas, sed la nunan svisan certe ne.




HODMEZOVASARHELY

(Hongrie).

---

**ANONCO**

Ni kompilas "Tutmonda Esperantista Adresaro". Se vi aprobas por vi senkostan aperigon de via adreso bv. fari la jenon: 1e sendu pk al "Info-Servo, Bismarckstr. 28, D-3550 Marburg kaj 2e informu aliajn Esperantistojn pri tiu ebleco.

**Nur unu HU 5!**
Lastatempe cirkulis nova listo pri hungaraj E-stampoj en la rondo de la E-filatelistoj, laŭ kiu HU 5 ekzistu en du varioj: kun hungara kaj kun esperanta tekstoj.

Niaj esploroj rezultis, ke nur unu poŝta stampo ekzistas, nome la hungarlingva stampo "MAGYAR VASUTAS ESZPERANTO KONFERENCIA". La alia, esperantlingva, stampo de Hodmezövasarhely el la jaro 1947 estas suvenira de la OK. La organizintoj siatempe publikigis en "Franca Epserantisto", N-ro 94, aprilo 1948 informojn pri la poŝta stampo.

Nia klubano Biesiada posedas karton, kie la hungarlingva nuligas la markon, dum la esperantlingva pozas apude. La dato en tiu esperantlingva diras: 23–25 de marto 1947, dum la hungarlingva precize diras: 1947, marc 23.

Geamikoj! Spertaj filatelistoj konas la praktikon de stampado dum E-kongresoj kaj konferencoj. Tial kompreneble povas okazi, ke oni trovas ankaŭ LKK-stampojn sur pm, sed, ili tial ne estas "poŝtaj" stampoj. Laste mi ekzemple ricevis kelkajn Prilep-stampojn: ankaŭ inter ili estis du stampoj de LKK sur pm. Sed tial ne fariĝis poŝtaj. Karaj geamikoj: ni ĉiuj helpu teni pura la vicon de niaj poŝtaj E-stampoj. Malseriozaĵoj malaltigas la reputacion de la E-filatelio en la filatela mondo.

**La pola n-ro 39: Ĉu apudstampo?**
Nia franca amiko Amiko Amouroux posedas tri el ili kiel "apudstampoj" = apud la pm kaj sur pm normala nuliga stampo. La datoj de nuligaj stampoj estas tiuj de nia n-ro 39. Demando do nur estas, ĉu nia n-ro 39 estas memoriga nuliga aŭ apudstampo. Kion pri tio diras pola stampo-katalogo?







65a Universala Kongreso de Esperanto ★ Stockholm 1980


1934
4–11 AŬGUSTO
STOCKHOLM
26-A UNIVERSALA
KONGRESO DE
ESPERANTO

## Pri la bulgaraj E-stampoj

Unu el niaj klubaj geamikoj sendis fotokopion pri "filatelaĵoj" el la 30a bulgara E-kongreso, okazinta 1947 en Plovdiv. Estis karto memoriga, afrankita kun la poŝta E-marko kaj stampita. La stampo tekstas "30a jubilea E-kongreso – Plovdiv – 5–6.7.1947" kaj havas helnigran koloron. Nia amiko demandis, ĉu estas poŝta tiu stampo.

Spertaj kaj longjaraj E-filatelistoj scias, ke tiu stampo ne estas poŝta, sed farita de LKK. Tiaj "filatelaĵoj" ekzistas de preskaŭ ĉiu bulgara E-kongreso. Estas vere komplike, trovi en tiu "kaoso" la vere poŝtajn stampojn. Tial ni rekomendas al ĉiuj, bone atenti nian stampokatalogon de 1978 kaj nur akcepti poŝtaj tiujn stampojn, menciitajn en ĝi.

Estus tasko de la bulgaraj filatelistoj, zorgi pri pura aspekto de listo de la bulgaraj E-filatelaĵoj, bedaŭrinde tio ĝisdate ne okazis. Tiel ekzemple ĝisdate estas duba la poŝteco de BU 1, kiun laŭdire oni uzis en Sofio kaj en Plovdiv. ("Bulgaria" – 16.6.1947 – 30a bulgara E-kongreso). Mi persone posedas multajn tiajn LKK-stampojn el Bulgario sur pm (ekz. Tarnovo 1978, Varna 1958, Pleven, Smoljan ktp). Aliflanke mi havas stampon de Burgas blazonforman el 1962, pri kiu mi scias, ke la poŝtistino en la kongresejo ĝin aplikis, ĉar persone mi ĉeestis tiun kongreson. Tiu blazonforma estas preskaŭ ĉiam trovebla apud la "normala" poŝta apudstampo.

Multaj el ni partoprenis la 48an UK en Sofio 1962. Ankaŭ mi. Kaj ankaŭ en tiu kongreso estis blazonformaj stampoj, ofte troveblaj sur niaj pk kaj kov. Sed mi persone ne memoras, ĉu tiuj stampoj estis en poŝta giĉeto.







52a Esperanto
Kongreso de SAT
Swanwick
13-20 Julio 1979

## Geamikoj, partoprenu en nia stampo-enketo!

En nia informilo n-ro 45 estis artikolo "Rareco de E-stampoj". Kiu ĝin atente tralegis konstatis en ĝi alvokon pri enketo de niaj E-stampoj. Celo estas, fiksi la gradon de rareco de niaj stampoj, kaj, eble, fiksi katalogan valoron al la unuopaj pozicioj. Tiun celon ni nur povus realigi, se ĉiuj niaj klubaj geamikoj plenigas la en n-ro 45 kunsenditan folion. Bonvolu noti, kiom da stampoj vi posedas de la unuopaj pozicioj. Do ekzemple AU 1: 5, AU 2: 3 ekz., ktp. kaj sendu la folion al nia redaktoro, kiu ja ankaŭ kompilas niajn stampo-katalogojn.

Jam nun vico da niaj geamikoj sendis la enketilon kaj ni kore dankas pro tio al geamikoj, Biesiada, Wluka, Berkhout, Fisher, Amouroux, Maekaúa, Vincent, Horak, Delcourt (nemembro!).

Jam nun eblas konkludi el la deko da enketiloj la gradon de rareco de kelkaj stampoj:
"Monda raraĵo" (RRRRR) ŝajnas esti (ĝis 10 konataj ekzempleroj):

BRA 2, 4, 5, 13
BRI 1, 6
FRA 1, 4, 5, 9
HIS 1, 2

Kaj la granda plimulto el niaj E-stampoj havas la gradon de Internacia Raraĵo (11–30 ekz.) ĝis Malgranda Raraĵo (– mil ekz.). Por ne miskompreni nin: por ni Esperantistoj ĉiu E-stampo estas volora materialo, dokumentoj pri la historio de nia Esperanto-movado.

## Pri la Esperanto-glumarkoj

Glumarkojn kaj sigelmarkojn ni uzas por propagandi ion sur kovertoj aŭ por fermi kovertojn. La kolektado de glumarkoj estas agrabla hobio por kelkaj gesamideanoj inter ni, ĉar inter la glumarkoj ekzistas ofte veraj perloj de la malgranda grafiko. Ofte la glumarkoj aperas en diversaj koloroj kaj sur divers-koloraj paperoj kun dentumita aŭ tranĉita rando.

La kolektantoj en pli fruaj jaroj kutimis glui la markojn en albumojn aŭ sur kartonojn. Hodiaŭ oni uzas celofanajn poŝetojn por aranĝi la glumarkojn sur ekspoziciaj folioj.

Ekzistas du ĉefaj kategorioj de glumarkoj: a) glumarkoj kun dato
b) glumarkoj sen dato

La datumitaj, "por-okazaj", glumarkoj estas pli ŝatataj inter la kolektantoj.

Iuj ordigas la glumarkojn laŭ la eldonjaro, aliaj vicigas ilin sur ekspoziciaj folioj laŭ specialaj grupoj: internaciaj kongresoj de SAT, UEA, IKUE, TEJO, naciaj kongresoj, foiroj, fakaj kunvenoj, jubileoj ktp.

La unua datumita aperis en la jaro 1906 okaze de la 2a UK de Esperanto en Genf (4 glumarkoj en 4 diversaj koloroj). Hodiaŭ ni povas nombri jam ĉirkaŭ 1 000 diversajn datumitajn glumarkojn en ofte tre multaj variaĵoj.

La sendatajn markojn oni kutimas devidi jene: propagandaj glumarkoj de firmaoj, gazetoj, urboj, komercaĵoj, societoj, personoj, helpmonoj kaj ceteraj simplaj glumarkoj, kiujn oni kutimas aranĝi laŭ la formato (kvinpintaj, rondaj, elipsoformaj, triangulaj ĝis sesangulaj, brik- kaj fantaziformaj). La nombro de glumarkoj sendataj estis pli ol 2 500 en la jaro 1961.

Kompreneble la apero de glumarkoj esperantaj provokis al katalogado. "Bazan ŝtonon" por esperanta glumarka katalogo metis la meritplena samideano doktoro Möbusz en Lübeck, Germanio, kiu aperigis jam en la jaro 1912 la unuan katalogon de datumitaj glumarkoj sur la paĝoj de "Germana Esperantisto".

En la jaro 1934 aperis la "Poŝkatalogo de la esperantaj por-okazaj glumarkoj" de la fama kolektanto d-ro Takacs en Nagymaros, Hungario. Eldonis ĝin la "Tutmonda Asocio Kolektanta". Rapide tiu katalogo estis disvendita. Jam 1936 sekvis nova glumarko-katalogo de sinjoro Georges Saget en Elbeuf, Francio, kiu grandajn meritojn havas ankaŭ en la Esperanto-Filatelio. Samideano Saget membris en la franca erinofilia asocio kaj en ĝi estris la fakon de niaj esperantaj glumarkoj. Krome li estis gvidanto de la loka filatela klubo kaj origanizis plurajn Esperanto-filatelajn kaj Esperanto-erinofiliajn ekspoziciojn. En la franclingva erinofilia gazeto "Arc en ciel" (ĉielarko) el lia plumo aperis artikoletoj kaj informoj pri la esperantaj glumarkoj. Sian lastan glumark-katalogon li eldonis 1955.

"Nova katalogo pri la por-okazaj esperanto-markoj (glumarkoj kaj poŝtmarkoj)" aperis en la jaro 1962 el la plumo de sinjoro Jensen en Danlando. Kun postaj aldonoj li notis entute 779 poziciojn ĝis al la jaro 1972. Sinjoro Jensen estis elstara kolektanto, kunfondinto de AREK kaj unua redaktoro de nia informilo FENIKSO ĝis 1972, kiam li devis forlasi nian mondon.

Hodiaŭ ni ELF-AREK-anoj daŭrigas la registradon de novaj glumarkoj sendante al nia glumarka komisiito Tremon informojn pri novaĵoj. Li tiujn informojn listigas kaj jam preparis provizoran suplementon por la Jensen-Katalogo. Li petis, ke ĉiuj erinofilistoj en nia klubo helpu lin en la finredaktado de tiu suplemento.

Ni rekomendas al nia amiko Tremon, ke li nepre preparu novan katalogon pri glumarkoj, aktualigitan kaj "purigitan" por la jaro 1987, jam nun li havas la subtenon de multaj niaj klubaj geamikoj por tiu tasko.

## Skisemajno en Suda Tirolio

26 januaro – 2 februaro 1980 okazos en Val Gardena (Wolkenstein) la nun jam 21a Internacia Fervojista E-Skisemajno. La partoprenontoj loĝos en la alpa domo de Bologna-fervojistoj. Organizas la skisemajnon nia kluba amiko Germano Gimelli de IFEA. La restado kun plena pensiono kostas 85 mil liroj.

Ni deziras al la organizantoj kaj partoprenantoj belajn kaj senĝenajn tagojn, sed ankaŭ kompreneble "kolo-kaj-gambo-rompon"! Por ni ni esperas akiri el la IFES filatelan suveniron.

## Bonvenon al novmembroj!

- Manuel Domingos Terramoto, Rua do Comercio, 38, 8700 Olháo, Portugal.
  Li kolektas uzitajn poŝtmarkojn pri temoj fiŝkaptado kaj Esperanto. Li estas komencanta filatelisto.
- S-ro Chikayuki Matsumoto, 301 Sakurazawa, Yorii-machi, Saitama, 369-12 Japan.
  Li havas intereson pri Esperanto-filatelio, sed ne jam materialon.
- S-ro M. Motalek, CS-798 45 Suchdol, u. Prostêjova.
  Li kolektas E-filatelaĵojn.

---

**ANONCO**
Ampelsan esperanto-filatelan kolekton deziras aĉeti nia kluba amiko Zdenek Stifter. Kontaktu lin kaj informu pri konsisto (katalogaj pozicioj) kaj prezo.

# 1-a suplemento por la stampokatalogo 1978

| | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|
| BE | 15-1 | Bruxelles-Br. | 1975 | 4.7 | Bruselo-Nordkapo | 37 |
| | 15-2 | Brussel-Brux. | 1975 | 4.7 | Bruselo-Nordkapo | 37 |
| | 16 | Liege | 1978 | 1.12–15.1.77 | E-Langue Internationale | 42x20 |
| | 17 | Verviers | 1976 | 15.12–15.1.77 | Sama teksto | ms 35x22 |
| | 18 | Borgerhout | 1978 | 7.4 | Esperanto pm-ekspo) | 38 |
| BRA | 28 | Marilia SP | 1978 | 17–22.7 | 1-a Latinamerika E-kgr | 31 |
| | 29 | Sorocaba | 1978 | 15–18.12 | Filatela E-Ekspozicio | 31 |
| BRI | 13 | Swanwick | 1979 | 13–20.7 | SAT-kgr 52a | 5-ĝga |
| BUL | 8 | Sofia 1000 | 1978 | 13.7 | 63a UK (UTK-stampo) | 35 |
| | 9 | V. Tarnovo | 1978 | 22–29.7 | TEJO-kgr 34a | ovala 36x30 |
| | 10 | Varna C | 1978 | 29.7–5.8 | UK 63-a | vi ni 35 |
| FRA | 42-1 | Montpellier | 1976 | feb-aprilo | Nacia E-kgr | ms 45x24 |
| | 42-2 | Montpellier | 1976 | samtempe | Sama kun PP en ds | ms 45x24 |
| | 43 | Grenoble | 1977 | feb-majo | Nacia E-kgr 69a | ms 45x24 |
| | 44-1 | Cl. Ferrand | 1978 | 13.3–15.5 | Kanzona E-Konkurso | ms 49x24 |
| | 44-2 | Cl. Ferrand | 1978 | samtempe | Sama kun PP en ds | ms 49x24 |
| GDR | 3 | Leipzig 1 | 1979 | 9–14.3 | Int. Foira E-Renk. | 40 |
| | 4 | Finsterwalde 1 | 1979 | 4–10.7 | Medicinistra E-renk. | vi ni 40 |
| HIS | 21 | Gijon | 1979 | 18–20.7 | Nacia E-kgr 39a | 30 |
| HUN | 63 | Budapest | 1978 | 14–16.7 | Nacia E-kgr 27a | 33x33 |
| | 64 | Abaliget | 1978 | 17.7 | IREN 11a | 6-ĝga |
| | 65 | Budapest | 1978 | 28.12–2.7.79 | VEF 8a | 33 |
| | 66 | Szeged | 1979 | 20.5 | Pacrenkonto 11a | 34 |
| | 67 | Miskolc | 1979 | 30.6 | Fervojista E-renk. | 5-ĝga |
| | 68 | Gyula | 1979 | 8.7 | SEU 1979 | 27x34 |
| | 69 | H.-hely | 1979 | 9.7 | IMEK 2a (medic.) | as 24 |
| | 70 | Abaliget | 1979 | 16.7 | IREN 12a | 35 |
| ITA | 27 | Montagnana | 1978 | 13.5 | Centenario Esperanto | 40 |
| | 28 | Roma | 1978 | 15.5 | IFEF-kgr 30a | 35 |
| | 29 | Gorizia | 1978 | 20.8–4.9 | ILEI-Konf. | 39 |
| | 30 | Cesena | 1978 | 4.9 | Nacia E-kgr 49a | 40 |
| | 31 | Lido Jesolo | 1979 | 27.8 | Nacia E-kgr 50a | 40 |
| JAP | 22 | Kobe | 1979 | 11–12.8 | Nacia E-kgr 66a | 32 |
| JUG | 24 | Prilep | 1976 | 29.7 | Nacia E-kgr 20a | ve 32 |
| | 25 | Ohrid | 1977 | 23.4 | E-societo Skopje | ve ni 32 |
| LUK | 2 | Luxembourg 1 | 1978 | 4–9.9 | E-Langue Internationale | ms 40x20 |
| | | | 1979 | 7–14.8 | Sama okaze 38a IKUE-kgr | ms 40x20 |
| MAL | 1 | Valletta | 1978 | 18–20.5 | E-ekspozicio | ms 49x27 |
| POR | 1 | Coimbra | 1978 | 17.6 | Nacia E-renk. 6a | 24x24 |
| SVE | 23 | Kungälv | 1979 | 2.6 | Sveda jarkongreso | 30 |
| SVI | 9 | Luzern 2 | 1979 | 1–28.2 | 64a UK | ms 33x19 |
| | 10 | Luzern | 1979 | 28.7–4.8 | 64a UK | 32 |

FRA 44-1 ekzistas ankaŭ en erara kunmeto: o = (13.3.78 – 19a).

**ELF–AREK–KLUBO**

**Prezidanto:**
Ivar Paulsson, S-171 33 Solna, Algatan 3

**Kasisto:**
Same. Sendu jarkotizon de 15 IRK aú 25 sved. kronoj.
Poŝtkonto 51 57 85-4, I. Paulsson, Solna

**Stampobanko:**
Werner Heimlich, D-304 Soltau, Fröbelstr. 4 (vicprezidanto)

**Redaktoro:**
Rudolf Burmeister, DDR 9047, Karl-Marx-Stadt, W.-Firl-Str. 30

---

Al vi ĉiuj, karaj kaj estimataj klubaj geamikoj, ni deziras ĝojan kaj agrablan Feston de l'Kristnasko en la rondo de viaj familianoj aú geamikoj.

Por la jaro 1980 ni deziras por vi vivon en paco, en sano kaj en homa feliĉo.

*Ivar Paulsson* *Rudolf Burmeister*

*****************************************************************************

Progamo de nia ELF–AREK Kunveno en Leipzig en la kadro de la Int. Esperantista Foira Renkontiĝo

7.3. = Interkona Vespero kaj malfermo
8.3. = Kunveno kaj ekspozicio
Festvespero
9.3. = Zoologia ĝardeno

Kotizo inkluzivas gastronomian prizorgon de 7.3 vespere ĝis 9.3 tagmeze kaj la tranokton.

Ebla pli longa restado dum la daúro de la foiro. (Printempa Foiro de Leipzig.)

Interesuloj tuj aliĝu ĉe la redaktoro, sed ili poste ankaú venu, ĉar kotizoj ne repageblaj pro hotelaj kaj restoraciaj kontraktoj.